

NI FESTIS LA ZAMENHOF-TAGON MULTLOKE

Kiel estas tradicie, la 15an de decembro la esperantistoj en la tuta mondo festis la Zamenhofan Tagon aŭ Tagon de la Libro kaj la Kulturo en Esperanto.

En Madrido la ĉefa celebrado okazis, kiel anoncite, en Fuenlabrado, en la sidejo pri kiu disponas Fuenlabrada Esperanto-Ligo, la sabaton 10an de decembro.

Ĉeestintoj aŭskultis bildigitan prelegon de Pedro Hernández pri la malkovro de la tombo de faraono Tutanhamon en Egiptio. Sekve, post "demando-mapo" kiel enkonduko de Ricardo Biurrún, oni starigis viglan debaton pri "Kia neŭtraleco en esperantaj kluboj aŭ societoj fronte la milito". Oni kunmanĝis la frandaĵojn portitajn de la partoprenantoj mem, kaj poste oni dolĉaĵumis babilante pri ĉio kaj nenio.

Partoprenis dekduo da homoj.

FINIĜAS KURSO KAJ VENOS NOVA

Ankaŭ la kurso kiu disvolviĝis en la sidejo, je la zorgo de Andy, festis la Zamenhofan Tagon kiel konkludon de la kurso. Oni legis tekstojn kaj ĝuis pecojn de la kulturo en Esperanto (vidu la apudan foton, eĉ se tiam mankis lernanto).

Meze de januaro komenciĝos kurso por progresantoj, ankaŭ gvidota de Andy. Se vi interesiĝas aŭ konas alian kiu ŝatus aliĝi al la kurso, bv kontakti kun la Liceo ĉe: madrid@esperanto.es aŭ rekte kun Andy.



PREZENTO POR LA KONKURSO DE DEBATO EN FUENLABRADO

Komenciĝis la preparoj por la konkurso pri debato en la municipoj de la suda zono de la madrida regiono, kaj specife la fazo en Fuenlabrado kun la temo: *"La UE tiene 24 lenguas oficiales; ¿debería ser el esperanto el número 25?"*. Dum la debato estos du teamoj; hazarde elektite, unu devos apogi Esperanton kiel helplingvon en Eŭropo kaj la alia kontraŭos.

Laŭ peto de la instruisto respondeca, nia juna samideano Jorge Brasal vizitis la 19an de decembro la lernejon "Salvador Dalí" en tiu urbo. Oni pretigis renkontiĝon unue en eta biblioteko kaj poste en klasĉambro ene de la mezlernejo kun 10 lernantoj plus 2 instruistoj.

En la komenco Jorge parolis pri Esperanto kaj ĝiaj lingvistikaj kuriozaĵoj, kaj poste ili aliris pli specifajn aferojn de la debato. Evidentiĝis ke la kunordiganto bone konis la temon, kaj la surprizo estas ke li estis antaŭe skribinta al oficialaj servoj de la Eŭropa Unio kun la tre konkreta demando: *"¿Se podría incluir el esperanto dentro de las lenguas que tiene la Unión Europea?"*. Ili akurate ricevis oficialan respondon, ne tute favoran, sed ankaŭ ne komplete malfavoran al ebla rolo de Esperanto, kiun oni povos uzi por la debato.

La debato komenciĝos la 27-an de januaro, kaj estas antaŭvidita antaŭa nova renkonto kun la lernejo, por plu pretigi la temon.

VIZITIS NIN

Nia amiko Orlando Raola kaj lia edzino Elsa vizitis denove Madridon, kaj la 29an de decembro rendevuis kaj kunmanĝis kun kelkaj madridanoj. Ankaŭ partoprenis la juna svisdevena esperantisto Oscar Hugues, ankaŭ vizitanta Madridon dum tiuj ĉi tagoj.



GENERALA KUNVENO DE MEL

Je la 30a de januaro oni celebros la devigan Ĝeneralan Kunvenon de Madrida Esperanto-Liceo, la loka klubo de Esperanto en Madrido. Anoj ricevos la kunvokon kun la necesaj detaloj kaj dokumentoj. Ne forgesu pagi vian kotizon, ĉu en la sidejo mem ĉu en la konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero de konto: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

Kaj se vi ne estas ano, la komenco de la jaro estas tre bona momento! Faru al vi tiun ĉi donacon: memoru ke la kotizo estas nur 12 eŭrojn jare. Plenigu la formularon kiun vi trovos en la fako "Dokumentoj" de nia retejo, <https://www.esperanto.es/mel/index.php/dokumentoj-documentos>, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es.

PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sen aparta programo. Pro la festoj, la unua tago estos la 9a de januaro.

La **unuasabata kunveno** okazos la 7an de januaro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Ni atendas la ĉeeston de ekstermadridaj amikoj kiuj troviĝos en Madrido dum tiuj tagoj.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida>.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.

FELIĈAN NOVAN JARON 2023!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

Redaktas Toño del Barrio

madrid@esperanto.es

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

